

Unesteno

Claude Gacond, 165-a radioprelego, 1966.12.07 & 1966.12.10

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

De la unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer stenografio ludis gravan rolon en la vivo de nia movado. Antaŭ la apero sur la merkato de portebaj registriloj, stenografio estis la sola rimedo por noti kongresan debaton.

A.- Nun, malgraŭ la teknika helpo de la registriloj, stenografio restas la plej praktika kaj sekura metodo por redakti kongresajn raportojn.

Cl.- Magnetofonoj povas subite panei, aŭ pro erara premo de la ŝaltiloj ĝi povas fuŝi registadon dum tuta debato. Kion fari poste por verki raporton ?

A.- Stenografo ne nur notas la asertojn de la debatantoj ; iliajn gestojn kaj la reagojn de la ĉeestantaro li povas ankaŭ noti.

Cl.- Pro tio stenografa raporto estas ĝenerale vivoplena. En nia kongresa literaturo ni posedas multajn dokumentojn pri la unua Universala Kongreso. Unu el la plej vivaj estas sendube la *Detala raporto pri la oficialaj paroladoj, diskutoj kaj decidoj okazintaj en Bulonjo-sur-Maró*. Temas pri stenografa raporto.

A.- Ĝia aŭtoro estas svisa pastoro nomata Friedrich Schneeberger. Esperantisto ekde 1903, kio nin mirigas hodiaŭ, li ne nur estis jam kapabla stenografi post du jaroj esperantajn paroladojn, sed li ankoraŭ estis trovinta la tempon ellabori stenografian sistemon, kiu estis adaptita al esperanto.

Cl.- Tiu pionira atmosfero, kiu regis ĝis la unua mondmilito, nin hodiaŭ mirigas. Ni malfacile povas imagi la spiritostaton, kiu regis en la tiama esperantistaro. Ĉio ŝajnis facile atingebla. Pro tio la tiama urĝemo bedaŭrinde kondukis multajn adeptojn de Zamenhof al rapida seniluziigo.

A.- Friedrich Schneeberger uzis en 1905 por stenografii la kongresajn debatojn en Bulonjo-sur-Maró la sistemon Stolze-Schrey.

Cl.- Pasintan jaron mi havis la okazon, dum vizito al la bofilo de Friedrich Schneeberger, admiri la stenografiitan raporton pri la kongreso 1905. Estas valora dokumento, kiun sinjoro Kreis-Schneeberger pie konservas, kun aliaj rememoraĵoj pri la eksterordinara lingva talento kaj laborkapablo de Friedrich Schneeberger.

A.- Dum la Ido-krizo Friedrich Schneeberger, kiu tiam estis prezidanto de Svisa Esperanto-Societo, forlasis nian lingvon por aliĝi al la lingvo de la Delegacio. Li fariĝis prezidanto de la Ido-Akademio kaj unu el la plej batalemaj kontraŭuloj de esperanto. Hodiaŭ lia bofilo Kreis-Schneeberger sekretarias en Ĝenevo ĉiam fidele al la Ido-movado.

Cl.- Sesdek jaroj forpasis. La stenografia sistemo proponita de Friedrich Schneeberger ne konvenis al nia lingvo. Ĝi estis tro rapide ellaborita. Tio neniel malgrandigas la respektemon, kiun ni ŝuldas al la svisa pastoro. Aliaj stenografoj sisteme studadis la avantaĝojn kaj malavantaĝojn por esperanto de ĉiuj stenografiaj sistemoj.

A.- Svislando por tiu laboro estis elektita tero, pro la renkontiĝo de tri grandaj lingvoj, kaj aŭtomate de tri stenografiaj sistemoj, ĉar ĝenerale ĉiu nacia lingvo adoptis apartan sistemon.

Cl.- Sub la titolo *Unesteno* ĵus aperis fine tre atente ellaborita lernolibro pri stenografio adaptita al nia lingvo kaj al la kongresa vivo.

A.- Kial *Unesteno* ?

Unesteno

Claude Gacond, 165-a radioprelego, 1966.12.07 & 1966.12.10

Cl.- **Un pro universala**

A.- do verŝajne **e pro esperanto**

Cl.- jes, kaj **steno pro stenografio**.

A.- *Unesteno* do signifas *universala esperanta stenografio*.

Cl.- Jen kelkaj vortoj pri la aŭtoroj de tiu nova metodo, al kiu ni esperas rapidan disvastiĝon. Heinrich Matzinger sin dediĉis profesie dum 50 jaroj al stenografio, kiel profesoro kaj kiel sistemkreinto. Li scipovas legi diversajn stenografisitemojn. Tribunaloj, policaj instancoj, universitatoj kaj privatuloj ofte konsultas lin por traduki internaciajn dokumentojn. Liaj ĝisfundaj lingvokonoj, diligento, profesia entuziasmo kaj sistematiko ebligis al li kompili plurajn lernilojn por la germana, angla, franca, itala, hispana lingvoj. Nuntempe li estas emerita profesoro de la zurika kantona komerca gimnazio.

A.- La alia aŭtoro de la sistemo nomiĝas Johannes Jakob Sturzenegger. Ni lin bone konas, ĉar li partoprenas ofte la laborkunvenojn de Esperanto-Edukistaro de Svislando, kies sekretario vi estas. Jakob Sturzenegger estas homo treege respektema kaj tolerema. Li estas la tipo de la serĉanto kaj de la agrabla kunlaboranto. Li certe havis la kvalitojn necesajn por estri la laborojn, kiuj kondukis al la verkado de la lernolibro *Unesteno*. Dum plurjara eksterlanda laboro li uzis unestenson profesie kaj private ĉiutage en pluraj naciaj lingvoj kaj konfrontis daŭre la malfacilaĵojn aŭ netaŭgecon de nacilingvaj stenografisistemoj por la internacia uzo. Lingvoj kaj internaciaj rilatoj apartenas al liaj ŝatokupoj.

Cl.- Trideko da kunlaborantoj desegnis la stenogramojn, kiuj troviĝas en tiu lernolibro.

A.- Tiu lernolibro estas verkita laŭ la moderna metodo nomata programado. Tiu metodo ebligas ĉu memlernadon, ĉu kolektivan instruadon.

Cl.- Estas du partoj en tiu libro. La unua interesos la vastan publikon. Ĝi instruas la fonetikan korespondan skribon. La dua interesos la fakulojn. Ĝi helpas rapidigi la skribadon helpe de mallongigoj.

A.- Do, kuraĝon ! Unue provu praktiki la fonetikan skribon *Unesteno*, kaj poste, se vi havas la energion pliperfektigi, pretigu vin por skribi ĉiam pli rapide.

Cl.- Vi aŭdis radio-prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-